



MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

# INFORMILO

1

JANUARO 2021 Kol. 428/37

XX

**Enhavo:** PF 2021; Salutvorto de Lenka Angelová; Jarmila.Rýznarová;  
EK Mladá Boleslav; La burgo Trosky en la Bohemia paradizo

XX



Estimataj geamikoj.

Finiĝis la jaro kun belaspekta numero, kiu estis por iu agrabla, feliĉa, por la alia trista, sed ĝenerale ĝi estis plena de doloro, de malsano, timo, nervoziĝo. Plena de ordonoj kaj malpermesoj, plena de protektaj vualtukoj. Krome forlasis nin por ĉiam multaj amikoj.

Sed la plej grandan perdon sentas AEH pro la forpaso de sia longtempa eksprezidanto, redaktorino de niaj Esperantaj periodaĵoj, sekretariino de la organizo, kaj koincide mia patrino - Jarmila Rýznarová. Ŝi ege mankos al ni por ĉiam.

Sed la vivo daŭros, ni klopodos gvidi nian Asocion plu, por la kontento de niaj membroj. Por atingi tiun celon, mi bezonas viajn reagojn, ke mi sciu, ĉu via intereso pri eldonado de niaj periodaĵoj - Informilo kaj Antaŭen - estu „daŭrigota“. Mi volas ankaŭ danki al niaj korektantoj, sen kiuj la presaĵoj ne atingus tiel altan nivelon. En la sama vico mi dankas al ĉiuj, kiuj sendis diversajn interesajn kontribuadojn, kaj samtempe mi kredas ke vi klopodos sendadi eĉ pli grandan kvanton da ili ankaŭ dum la tuta nova jaro 2021.



Ĉar vi estis longtempe fermitaj en via hejmo mi, depedante de la direktiloj de la registaro kaj esperante, ke estos pli bone, invitas vin partopreni la lingvan seminarion en la hotelo „Kavka“ en Malá Skála

en aprilo 2021. Kaj somere ni planas busan karavanvojaĝon al la 106-a UK en Belfasto, kunigitan kun ekskursado por la ekkono de tiu parto de Irlando.



Mi kore deziras al vi, ke la jaro 2021 estu pli feliĉa, pli libera, ke tiu damna furio kovido-19 malaperu el la mondo, ke vi ĉiuj estu sanaj, ke vi povu plene ĝui vian vivon kaj belaĵojn de la mondo.

Via Lenka Angelová, prezidantino de AEH

# Jarmila Rýznarová

(1929-2020)



La 5-an de decembro 2020 forpasis honora membrino de ĈEA, Jarmila Rýznarová el Pardubice.

Ŝi naskiĝis la 13-an de decembro 1929 kiel Jarmila Urbanová. Du jarojn ŝi studis en komerca lernejo en Pardubice, poste ŝi trairis plurajn pedagogiajn kursojn kaj submetiĝis al ekzameno pri tajpado kaj stenografio. Laboron de oficistino ŝi trovis en pluraj entreprenoj: elektrejo, Stavoprojekt, Kovofiniŝ en Ledec nad Sázavou, Kniha, presejo. Ŝi havis sinsekve tri edzojn: Miroslav Rybáček (patro de Mirka kaj Lenka), Linhart Rýznar kaj Josef Vaněček.

Esperanton ŝi lernis en 1953, ĉar ŝi volis helpe de UEA-delegito trovi sian onklon en Bombajo. Kaj ŝi restis fidela al la internacia lingvo dum sia tuta vivo, gvidante kursojn por plenkreskuloj kaj infanoj, organizante Esperanto-tagojn kaj buskaravanojn al eksterlando, eldonante publikaĵojn kaj informilojn.




Multe da energio ŝi dediĉis al la verkaro de Stanislav Schulhof kaj lia heredaĵo, ne nur esperantlingva, sed ankaŭ ĉeĥlingva. Ŝi prizorgis la publikigon de liaj verkoj kaj akcepton de lia nomo en la nomon de la esperantista klubo en Pardubice.

Kun Josef Vaněček ŝi fondis Asocion de Esperantistoj-Handikapuloj kaj komune ili komencis eldonadi la AEH-informilon, kiu

informas plej ofte el ĉiuj similaj organoj (nun 425 numerojn). AEH ankaŭ kunlaboris kun la pensio Skokovy, kie ĝi organizis kursojn.

Jarmila Rýznarová prilaboris plurajn publikaĵojn, nome gvidlibron tra Pardubice, biografiojn de Stanislav Schulhof kaj Francisko Valdomiro Lorenz kaj 100 jarojn de Esperanto en Pardubice.



*Jarmila Rýznarová (meze) kiel honora gasto en 2018, kiam la biblioteko en Vrdu akceptis la nomon de F. V. Lorenz, ĉar ŝi verkis lian biografion*

Por la Almanako Lorenz, eldonata en Brazilo, ŝi verkis la artikolojn *Esperanto en la ĉeĥa urbo Pardubice* (2008), *La vivo plena de muziko* (2012), *Miaj travivaĵoj en la dua mondmilito – rememoroj* (2014), *Amikeco* (2016), *Mia unua vojaĝo okcidenten* (2018).

Kiam la Nacia Biblioteko startigis la projekton Nacia Kroniko, instigante precipe emeritojn, ke ili verku siajn rememorojn, ŝi enmetis du kontribuojn: *La vivo plena de muziko* pri la operkantistino Vlasta Urbanová (onklino de Jarmila), (la sama artikolo kiel en la Almanako Lorenz, sed ĉeĥlingve) kaj *Historio de familio Urban*.

Ankaŭ ŝiaj filinoj Mirka kaj Lenka estas aktivaj esperantistinoj, kiuj daŭrigas ŝian laboron. -mm-

## Esperanta klubo en Mladá Boleslav

Boleslava rondeto ĝuas kelkajn avantaĝojn. Inter ili estas la fakto, ke ni loĝas proksime. Unu al la alia ni sciigas informojn pri lokaj kulturaj aranĝoj kaj favoraj ebloj por handikapuloj kaj la homoj „65+“. Ni poste havas sufiĉe multe por babiladi pri travivaĵoj. Tio estas iom malfacila, ĉar rakonti esperante ne ĉiam estas facile.



La Zamenhofan tagon ni realigis en tri partoj. La unuan fojon ni kunvenis en ĝardeno je la 2-an de decembro. La vetero estis venta kaj malvarma. Trinkinte teon kaj disdoninte "donacojn - nedonacojn" ni ion esperantumis per preparita programo kaj unu post la alia ni disiris kaj restis nur la bone vestitaj kiuj estas sur la fotografaĵo.



La duan solenaĵon de Zamenhof ni aranĝis en la urba observatorio. La nuba ĉielo ne permesis al ni vidi konjunkcion de planedoj, kiu nomiĝas "kristnaska stelo". Kaj la trian kunvenon ni aranĝis por tiuj, kiuj ne estis en la observatorio.

J. Drahotová

## Esperantaj lingvaj seminarioj

Tradicie ili jam okazadas en la regiono Bohemia Paradizo. En tiu ĉi parto troviĝas ankaŭ la burgo-ruino Trosky. Eble vi tiun lokon jam vizitis (ekskursante tien ĉe la Skokovy-seminarioj), aŭ almenaŭ vidis sur fotoj, aŭ rimarkis dum veturo al la seminario. Pri ĉiu simila objekto, burgo aŭ ruino, ekzistas iu legendo.

Do eble vi volonte tralegos la plej konatan legendon pri la ekesto de la nomoj de ambaŭ turoj de la burgo Trosky. Kiel tio okazis?



La burgon Trosky posedis grandsinjoro el Bergov, kiu klopodis el la burgo konstrui faman restadejon. Sed lian klopodon rompis aliaj devoj. Tiam li alvokis sian patrinon

Maria kaj sian filinon Karolína. „Mi devas forveturi por iom longa tempo en malproksiman regionon. Promesu, ke vi tiutempe prizorgos pri Trosky tiel bone, kiel mi!“

„Jes, mia filo, ja vi scias, kiel brave kaj saĝe mi regis antaŭ jaroj“ aprobis lian deziron Maria.

„Jes paĉjo, mi promesas. kaj revenu baldaŭ reen hejmen.“ ridetrespondis Karolína.

Do, la grandsinjoro forveturis. Ambaŭ virinoj dum kelkaj monatoj plenumis liajn ordonojn respondece, la regiono floris kaj Trosky-n komencis vizitadi eĉ konataj princoj, kiuj estis korteg-maniere akceptataj.

Sed la regado ege plaĉis al Maria kaj ankaŭ al Karolína.

„Kial do mi ne regus sola?“ demandis Karolína al si mem, kiam ŝi matene admiradis sin en spegulo. „Belega mi estas, certe iu junulo volos edziĝi kun mi. Poste ni regus komune kaj la patriron Maria ni ne bezonos. En la sama momento Maria legis kronikon kaj subite atakis ŝin jena ideo: „Karolina estas sensperta regantino. Ĉu eble venos iu junulo kaj volos edziĝi kun ŝi? Certe mi tiam povus perdi mian regadon! Tion mi ne permesos!“

Tiutage ili ekkverelis, kiu anstataŭos la grandsinjoron el Bergov. „Mi estas pli juna kaj pli bela, mi estas lia filino, do laŭ leĝo tie ĉi regi estas je mia flanko.“

„Kaj mi estas pli aĝa, pli saĝa! Li estas mia filo, do mi rajtas regi en Trosky.“ kontraŭmetis Maria.

Ĉiu el ili posedprenis unu el la turoj de la burgo. Maria okupis tiun pli dikan kaj pli malgrandan, Karolína tiun pli sveltan kaj pli altan. Ili ne eliradis eksteren, nur el la malgrandaj fenestretoj ĉiutage kriis kontraŭ si reciproke kaj sakris la tutan mondon.

La regiono ĉirkaŭ Trosky rapide paŭperiĝis. La virinoj konstante kverelis kaj la homoj en la valo sub la burgo por ĉiam perdis veran reganton. La geservistaro fuĝis, la birdoj ĉesis ĉirkaŭflugi la turojn kaj preskaŭ neniu kuraĝis alproksimiĝi al la



burgo. Se iu venis en la apudan arbaron pluki frambojn aŭ mirtelojn, tiu aŭdis nur senĉesajn kverelojn de Maria kaj Karolína.

La grandsinjoro el Bergov nenion sciis pri la afero. Li restis eksterlande. Neniam li venis por akordigi la rilaton inter la virinoj.

Post iom da tempo la krioj malaŭdiĝis. Unu kuraĝa junulo eniris en la pli dikan turon, sed neniun li trovis, same kiel en la pli alta turo. Nur malfermitajn fenestrojn. Ĝis hodiaŭ neniuj scias, kie la virinoj perdiĝis.

La homoj revenadis en la regionon, revenis ankaŭ la feliĉo kaj la amikeco. Komune ili komencis plibeligi la subburgejon. Fine ili ambaŭ turojn alnomis – la pli dikan laŭ la maljuna Maria – Baba (Avinaĉo), kaj tiun pli altan laŭ la juna Karolína - Panna (Virgulino).

Tradukis Pavel Nechvíle

## Estimataj legantoj,

ĉu vi bakis bongustajn kristnaskajn sukeraĵojn aŭ alian vian specialaĵon? Bonvolu sendi al ni vian plej ŝatatan recepton.



Antaŭdankas la redakcio.

**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**  
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice

Redaktoroj: Lenka Angelová, Ludmila Srbová

Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,  
530 03 PARDUBICE, CZ tel. 775323903

e-mail: [aeh@esperanto-ah.eu](mailto:aeh@esperanto-ah.eu) interreto: [www.esperanto-ah.eu](http://www.esperanto-ah.eu)

Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010

Bankovní spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**

**IBAN:** CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX

La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)

Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)

Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.

Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z

La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.